



SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1982

N° 82

Langvedoka-Rusiljona Kongreso PERPINJANO - 9-an de majo 1982

Jam sabaton estos organizita akcepto ekde la 15 h ĉe la Kultura Centro, 72, Av. du Général de Gaulle kaj je la 21 h, interkona-vespero, 2, Strato St Mathieu.

Bonvolu konatigi vian partoprenon antaŭ la 30^a de Aprilo al : Kultura-Esperantista-Centro, 72, Av. du Général de Gaulle, 66000 PERPIGNAN por la bona organizo de la tagmanĝo kaj okaze de rezervado ĉe hotelo. Tel: 16 (68) 34-22-18 .

Oficiala Programo : Dimanĉo 9an de Majo :

9h 30 : Malfermo de la kongreso ĉe "Centre Culturel Catalan", 2, Strato St Mathieu, fronte al la preĝejo St Mathieu.

12h 30 : Komuna tagmanĝo : 4, Strato Franklin, apud la Kultura Esperantista Centro (45 F sen trinkaĵo).

15h : Vizito de la CASA PAIRAL (apud la kongresejo), Monumento Castillet, Muzeo de la Katalunaj Artoj kaj Tradicioj.

Niaj Katalunaj Samideanoj de la regiono : GIRONA kaj BARCELONA partoprenos nian renkontiĝon kaj parolos pri sia agado.

GRATULOJN al nia Prezidanto, LLECH-WALTER, promociita "COMMANDEUR dans l'ORDRE des PALMES ACADEMIQUES", de la Ministro de la NACIA EDUKADO, Alain SAVARY. (Parizo, la 4-an de Februaro 1982).

74-a Nacia Kongreso de U F E

de la 28 a de M A J O ĝis la 1 a de J U N I O 1982

(ALIĜILO en FRANCA ESPERANTISTO - n° 333 / 01 / 1982)

ORLEANS

A L E S : La Departementa Federacio kunvenis la 24an de Ol en NIMES. Pro la baldaŭa transloĝigo de Ges-roj RAYNAUD al Nîmes, okazis Sanoj en la estraro de la grupo :

- S-ro RAYNAUD daŭre estos Prezidanto de la Dep-a Federacio.
- S-ro CORNUT, 12 Rue du 19 mars 1952, ALES, fariĝas Prezidanto de la "Verda Stelo" en Alès, kaj Sekretario de la Dep-a Federacio.
- S-ino PICAL, Sekretariino.
- S-ro BOLLA, kasisto.
- S-ro PELLETIER daŭrigos la kursojn en Alès

La Asembleo unanime adoptis la jenan rezolucion :

" Les Esp-tes Français souhaitent instamment que la Majorité Parlementaire et le Gouvernement actuels donnent suite aux promesses faites par M. MITTERRAND, Président de la République lui-même, à leur Association Nationale, avant les élections de Mai et Juin, concernant l'introduction de l'E. dans les programmes scolaires. Ils demandent également le droit à l'expression et à l'information sur les ondes de la radio et de la télévision nationales."

La Asembleo, kiu multe bedaŭris la re-nuligon de la preleg-vojaĝo de S-ro ILOV, proponas ke estu organizita, krom la nunekzistanta organizo de prelegvojaĝoj, "Vizitanto-Servo" enkiu sin anoncu eventualaj prelegvizitantoj kun petataj kondiĉoj, kaj grupoj aŭ membroj pretaj gastigi tiajn prelegantojn kun proponitaj kondiĉoj.

M O N T P E L L I E R : S-ro LENTAIGNE kaj S-ino ROUQUETTE kune, lukse kaj afable gastigis kaj ĝojigis tridekon da partoprenantoj en Balaruc-les-Bains, la 10an de Januaro, memore al Zamenhof. Gratulon kaj dankon !
- La grupo (5, Rue du Dr Roux) jam okupiĝas pri la organizo de la Internacia Esp-ta Semajno en SETE : ĝi okazos de la 12a ĝis la 19a de Septembro. Detalajn informojn vi trovos en aparta folio. Pripensu ĝin!
- Por ke la kunvenoj de la grupo fariĝu pli interesaj, la grupanoj akordiĝas por elekti antaŭdeciditajn temojn : Dum la kunveno, iu volontulo prezentas la temon kaj ni diskutas tiamaniere ke ĉiuj povu diri siajn opiniojn. Inter la lastaj temoj oni povas mencii : Problemo de etnaj lingvoj, Atomenergio, Vegetarismo, Historio de la "Unua de Aprilo".

B E Z I E R S : La grupo daŭre laboras kaj planas jen vojaĝon, jen partoprenon en kongresoj.

- Dankon al Gisela kaj Jean-François PASSARELLA, kiuj sendis belan rakonton pri sia renkontigo ĉe "la limo de la mondo". Legu ĝin pli poste!

N I M E S : Pro la nuligo de la prelegvojaĝo de S-ro ILOV kaj ĉar oni tiuokaze jam disponigis al ni Cambron, ni organizis en CES Feuchères inforkunvenon pri E. kun Ekspozicieto kaj lumbildoj; sekve 2 mezaĝaj personoj kaj 1 junulo eklernas E-n ĉe S-ino VOLPELIERE; ankaŭ juna studento revenis al la lernado. En CES Feuchères mem, S-ro CARREY, Instruisto pri muziko malfermis E.-Klubon por deko da gelernantoj.
- La 30an de januaro, S-ro JOUBERT, Instruisto pri angla lingvo invitis nin prezenti E-n al liaj gelernantoj (4a Klaso) : Tion ni faris per paroliga leciono kaj lumbildoj. Ĉu malfermo de klubo sekvas ? Ni proponis ĝin .

P E R P I G N A N : Ni ricevis de S-ro BOUMAL interesan raporton pri lia " Antaŭ-kongresa vizito al Antverpeno" (Belgio), kiun ni aperigos en venonta SFS, kiel plaĉan instigilon al partopreno en la U.K. en Julio.

MIGRANTE TRA METIOJ

En "Sudfrancia Stelo" n° 74 - 2a trimestro 1980 - mi omaĝis la verkistan talenton de VALO (plumnomo de nia nima samcelano Raymond LAVAL) kvaŝaŝu recenze tra la tri unuaj volumoj de lia aŝtobiografio.

Antaŝu ne longe aperis la kvara volumo ŝi-titole nomita.

En la antaŝparolo, la aŝturo reliefigas la francan proverbon : "rulinganta ŝtono ne amasigas muskon!", kiun, en sia proverbaro, Zamenhof reeŝis : "eŝ ŝtono verdigas, se ĝi longe ne moviĝas !". Tamen permesu al mi opinii, ke tiu populara diraĝo meritas ian modulon.

En okupaciita Germanio, post la unua mondmilito, kiel freŝa inĝeniero de la Aikso-la-Provenca-Lernejo "pri Artoj kaj Metioj", R. LAVAL realigis siajn infanajn revojn pri lokomotivoj.

Kvar dek el la cent ok paĝoj de la libreto estas ĝuste por rakonti pri tiu cetere ne tre longa sed mejloŝtona epizodo de lia profesia vivo.

Sekvas rilato pri kelkmonata dungigo ŝe la pariza foiro kaj intensa vivo kiel teknikisto en la kulisoj de la ŝefurba "sepa arto". Dujara laboro en malgranda uzino pri optiko donis al R. LAVAL la okazon doni plian dimenŝion al sia teknikista kapablo kaj signis la finon de lia pariza vivo. Komenciĝis nova profesia etapo en Klermonto, ŝefurbo de la kaŝŝuk-industrio, ŝe Michelin. Grandparton de la dummilita periodo li travivis en pirenea uzino, kies ŝefa kliento estis la aerministerio . Post la militfino, en 1947, R. LAVAL revenis al la nesto de la kara infaneco, en ALESO, por tie labori ŝe la Kompanio de Minoj, gisejoj kaj forĝejoj. Tio daŝris sep jarojn antaŝu ol li reprenis la vagulan bastonon, kiu kondukis lin refoje en la parizan regionon ŝe fabriko de buldozoj, mekanikaj ŝovelilegoj k.s. Tute efemere li tie restis ĝis realvoko en Bearno, en Paŝo kie lin trafis la 65-a jaraĝo, dato de la emeritigo. Jam pasis 15 jaroj !

La stilo de VALO estas ŝiam agrabla kaj simpla, iom poezia kiel tradicia provenca rakontmaniero. Kion simplan sed korligigan li scias komuniki. En tio kuŝas la plena valoro de verkisto.

Notindas, de tempo al tempo, mencioj pri anarkiismaj, filozofiaj kaj sociologiaj simpatioj tra travivaĝoj de la aŝturo.

Kun eldonjaro 1982, la koncerna libreto jam aperis en decembro 1981 ŝe la broŝurservo de S.A.T. kaj estas aŝetebla ŝu ŝe kutima libroservo de tiu Asocio, ŝu ŝe la eldonisto ("Cercle Esperantiste de l'Agonais - 47340 LAROUQUE TIMBAUT"), kiu provizas, je tre malalta prezo, nian literaturan verkaron. Inter ĝi troviĝas, krom la kvarvoluma aŝtobiografio de VALO, lia originala "pri la esperanta literaturo" kaj manpleno de liaj tradukoj el Han RYNER (verknomo de la franca filozofo Henri NER), kun kiu li amikiĝis same kiel LANZI.

Renkontiĝo je la Limo de la Mondo

Kiam oni demandas enloĝanton de Bona Espero : "-Sed kie en Brazilo vi troviĝas ?" la respondo plej ofte estas : "-Je la limo de la Mondo !"

Jam antaŝu pli ol dudek jaroj brazilaj Esperantistoj fondis la "Fazenda-Escuela Bona Espero-n" en la ŝtato GOIAS, 250 km norde de la ŝefurbo Brazilja, kun la celo zorgi la edukadon de infanoj. En Eŝropo oni precipe aŝdis pri tio ek de kiam Ges-roj GRATTAPAGLIA forlasis Italion por vivi kaj labori tie. Dum vojaĝoj en Eŝropo ili rakontis entuziasme pri ilia libera vivo en la sovaĝa savano je la limo de la mondo kaj multaj komencis revii, ankaŝu mi.

Mi vojaĝis tien por konatiĝi kun Bona Espero. Ĝi situas vere izolite . La plej proksima vilaĝo Alto Paraiso estas 20 km for : Inter tiu-ŝi kaj Brazilia sur pli ol 200 km neasfaltita vojo, somere polva, pluvsezone ŝlima, troviĝas nur 3 (tri !) aliaj vilaĝoj. Oni vivas sen elektro, sen televido, sen radio, sen ĵurnalo, sen telefono, sen ŝiovendejo, sed kun pura aero kaj pura akvo. La ŝiutaga lingvo estas Esperanto, kaj tiel mi estis fine devigata paroli la lingvon, kion mi ne ofte kuraĝis ĝis tiam

...../.....

Laboro ne mankas : la instruado de ĉirkaŭ dudek infanoj, la kuirado, la bakado de la pano, la semado de legomoj kaj ilia defendo kontraŭ formikoj kaj birdoj, kaj la zorgado de la kokinoj kaj bovinoj. Ofte okazas vizitoj de najbaroj loĝantaj malproksime, kiuj venas por interŝanĝi kelkajn el siaj terpomoj aŭ melonoj kontraŭ uzitaj vestoj el Eŭropo.

Terre des Hommes ĵus estis doninta monon por ripari la tegmenton de la malnova lernejo, sed post kalkulado la estraro decidis konstrui novan, per la sama mono kaj farante ĉion mem. Do, apud la ĉiutaga domo -kaj bieno- mastrumado ni komencis preni sablon el la rivero helpe de preskaŭ sovaĝaj ĉevaloj, transportis ĝin per la malnova traktoro kaj provis funkciigi maŝinon por fari beton-brikojn. Finfine ni sukcesis produkti la necesan kvanton de brikoj (ĉ.3000) kaj ni fosis la truojn por la fundamento de la nova lernejo.

Ni, tio estis la ĉiam en Bona Espero loĝantaj estraranoj S-ro Arthur Vellozo Vasconcellos, brazilano kaj unu el la fondintoj, Ges-roj Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, italo kaj germanino, kaj krome, David el Usono, Jean-François el Francio, José Carlos el Brazilo, Miguel el Argentino kaj mi el Germanio.

Certe, ni ne ĉiam nur laboregis. Ni ankaŭ promenis kun tutmondaj vizitantoj sur la Monton Baleno, aŭ laŭlonge de la rivero al la akvofalo, aŭ sur la monteton kun la busto de L.L.Zamenhof. Kaj ni vizitis la 1-an Sudamerikan Esperanto-Kongreson en Marilja, en la ŝtato Sao Paŭlo, kiu estis tre interesa kaj gaja, kaj kie ni konatiĝis kun multaj fervoraj Esperantistoj el Sudameriko.

Post entute dekmonata restado mi forlasis Bonan Esperon kun unu ĝoja kaj unu ploranta okulo. Mi ploris ĉar mi devis adiaŭi amikojn, sed mi ne foriris sole : mi renkontis tie mian edzon kaj ni ambaŭ revenis al Eŭropo. Dum nia geedza vojaĝo en Sudameriko ni revizitis Bonan Esperon kaj ni tre ĝojis vidi la rezulton de nia kuna laboro, la novan lernejon. Ĝi estis nun plena de gajaj infanoj, kiuj ludis senĝene laŭte en la trankvila izoleco je la limo de la Mondo .

Gisela PASSARELLA

6, Rue du Porche

34290 SERVIAN

Pri minoritataj Lingvoj

(Kiel jam anoncita : fina punkto....)



Vasta temo, diversaspekta laŭ la landoj. Ni rigardos ĝin nur el du limigitaj vidpunktoj :

- 1°- Kiel staras nun la demando en nia regiono ?
- 2°- Kiel ni, esperantistoj, rilatu al ĝi ?

- I -

En nia regiono, ĉu temas vere pri lingvoj de etnaj minoritatoj meze de la franca nacia plimulto ?

Tiel estas eble pri la Kataluna (Kvankam en Rusiljono ĝi estas malpli uzata ol en la hispana parto de Katalunio)(1) Sed kio pri la okcitana ? En Langvedoko, eĉ tiuj maljunuloj, kiuj memoras la lingvon de siaj avoj, uzas plejofte, se ne ekskluzive, la francan. El la junaj, krom kelkaj amantoj de folkloro kaj militantoj de aŭtonomistaj movadoj, kiom kapablas flue paroli, aŭ eĉ nur kompreni la lingvon de "OC" ? De Francisko la 1^a al Riche-lieu, de la Jakobenoj al Napoleono kaj Jules Ferry, ĉiuj centralizemaj registaroj strebadis por hegemonio de la franca lingvo. Ŝajnas nun, ke almenaŭ en nia regiono, tiu hegemonio estas definitive firmigita .


Certe, tio estas bedaŭrinda, pro la kultura valoro de la okcitana lingvo kaj de ĝia literaturo. Oni povas almenaŭ bedaŭri, ke la Okcitanoj ne restis dulingvaj, uzante inter si sian propran idiomon (aŭ sian lokan dialekton) kaj kun la ceteraj francianoj la nacian lingvon. Sed tio estas fakto, eble ne-inversigebla. Pri tio decidis la estonteco. Se la Vaskoj,

K R U C V O R T O J

Horizontale



- 1- Li zorgas pri la sekureco de eminentulo (R)
- 2- La plej nobla celo al kio oni strebas. Unujara herbo kreskanta
- 3- Heluĝeta. Fonetike. Inversita frukto. [en sekaj lokoj]
- 4- Kovri per maldika tavolo de iu multvalora metalo
Tapeto teksita en Pariza ŝtato manufakturo.
- 5- Longa ronda trabo aŭ stango
Detala redaktaĵo de la diversaj partoj de filmo (R)
- 6- Stelo aŭ kometo (R). Kvanto de varoj (R). Meze de kantoj
- 7- Rilata al la ĉefa organo tubeto.
Por signali danĝeran lokon en maro aŭ rivero (R)
- 8- Aroma trunko ŝelo uzata en formo muelita kiel spicaĵo (R)
Nombro inversita. Simbolo de submetiĝo subtrudordona potenco (R)
- 9- Antaŭ esto: sanga dulto. Rilata al Romia imperiestro
- 10- Ano de Eŭropa duoninsulo (R). Muldilo (R)
- 11- Subjuncio. Pinglarbo (R). Delikate tuŝeti
- 12- Kava velo (R). Ĝi estas kvazaŭ la spino de la ŝipo (R). Unuo de elektra rezistanco.



René Raynaud (1982)

Vertikale




- 1- Mandivenisto (R)
- 2- Parfumas post bon - Prepozicio
- 3- Rilata al fizika grando kies simbolo estas (R)
- 4- kunarangi plej malvaste en kasto viajn objektojn (R)
- Estanta en pli ol supiza grando - Ne taŭge punkcii (R)
- 5- Finajo de teknika vortoj, indikanta specialiston. La vokaloj miksitaj, "de la nova mondo"
- 6- Rezultode Futbalo - Meze de esto. Al tro nova ne fidu (R)
- 7- Baro.
- 8- Malofteco. Sufikso, sed inversite; tre admirata persono
- 9- Idiomo (R) - Rampulo (R)
- 10- Unu movo en ia direkto (R) Sufikso - Unu triono de Mesidoro, du de Termidoto
- 11- Paŝa aŭtomatismo kaŭze de lezoj en la cerbo, aŭ sekve de malsano aŭ de ŝoko (R)
- 12- Eŭropa ŝtato.


* - (R) nur radiko

* - Solvo de la antaŭa problemo


I	N	T	E	R	K	O	N	S	E	N	T		
N	E	O	F	I	T		O	I	S		E		
T	I	L	I		N	E	K	T	A	R	O		
E	G		K	E		S	T	O	M	A	K		
R	E	N	O		A	T	A		E	D	R		
R	B	T		A	M	I		A	N		I		
O	L		K	L	A	M	A	S		K	T		
M	A	G	N	E	T	O	F	O	N	O			
P	E	R	A	N	O		A	C	E	R	O		
I	K	A	R	O		A	B	I		N	I		
T	I	M	I		A	L	L	O	G	I	S		
A	T	O	L	O		K	A	J	A	K	O		



5 minutoj de paŭzo




Vi povas resti trankvile en via angulo kara policisto, mi jam ekskuzis min.



Kia surprizo ! Ili similas vere homaro...



La gvidlibro diras : «RIPAROTA».



En la lito estas agrabla varmeco precipe post la kombino kun la centra hejtilo, kiun faris Roberto.



SEN VORTOJ



SEN VORTOJ

la Bretonoj, la Korsikanoj, la Alzacanoj sukcesos plifortigi siajn ankoraŭ vivajn idiomojn, eble ilia ekzemplo instigos la Okcitanojn revivigi la sian....

- I I -

Por ni, Esperantistoj, kion signifas la Kataluna kaj la Okcitana ?

Fronte al la minoritataj lingvoj, la sinteno de la esperantistoj estas diversa. Iuj aprobas la movadon por ilia revivigo; aliaj malaprobas ĝin. Estas tamen unu tereno, sur kiu ni ĉiuj povas interkonsenti.

Ni jam aludis pri kultura valoro de la Okcitana, kaj tiu de la Kataluna estas eksterduba. Nu, eĉ se tiuj lingvoj devus morti, ĉu ni lasu perdiĝi por la tutmonda esperantistaro ilian literaturan trezoron ? Estas ja bedaŭrinde ne ĝui alian propran guston el la originaloj de la trobadoroj kaj de la felibroj; sed samon oni povas diri pri la senmortaj ĉefverkoj de la antikvuloj. Kiom da nuntempuloj kapablas legi Homeron kaj Vergilion en la grekaj-latinaj tekstoj ? Ĉu tial ni rezignus ? Se ni estas blindaj kaj surdaj al la forma beleco de tiuj verkoj, almenaŭ ilia funda riĉaĵo restas je nia dispono pere de bonaj tradukoj.

La Okcitana literaturo ne estas tre disvastigita ekster Francio. La verkoj de la trobadoroj estas pli-malpli troveblaj en antologioj kun franca traduko, kaj tiuj de la felibroj estas ĝenerale tradukitaj de la aŭtoroj mem en francan lingvon; sed, krom Mirejo, nur kelkaj erudiciuloj konas ilin eksterlande, ĉar ne ekzistas aliaj tradukoj. Jen estas tasko por sudfranciaj gesamideanoj : Esperantigi la majstroverkojn de sialingva literaturo.

Jam ekzistas en E. Kataluna Antologio; ankoraŭ ne en Okcitana. De la Provenca Mirejo estas esperantigitaj nur la tri unuaj kantoj : Kiu donos al ni la naŭ aliajn ? Kiu tradukos Calendal, Nerto, "La Memori e Rakonte", k.c. ? La verkoj de Guduli, de la Faro, de Aubanel, de Bigot, k.a., kaj la belajn kantojn de la mezepokaj trobadoroj ?

Mi provis esperantigi el la Provenca originalo la Poemon de Rodano. Mi elektis ĝin tial, ke ĝi tre plaĉas al mi, sed ankaŭ tial ke ĝi estas la plej facile tradukebla el la mistralaj versaĵoj (pro la senrimeco). Pli malfacilajn alfrontu pli kapablaj !


Vasta tasko atendas la plej talentajn el nia kolegaro. Eble iliaj tradukoj, pro la nunaj malfacilaj cirkonstancoj, longe dormos en tirkestoj, en formo de manuskriptoj (ankaŭ mi ne scias, ĉu iam mi vidos mian Poemon de Rodano eldonita). Tamen ne estas tro frue por komenci. Do, ek al laboro !

"Pri l'tempoj estontaj pensante".....

P.S.- La ĉi-supra teksto estis verkita kiam mi ricevis la tri lastajn numerojn de la literatura revuo "PONTO", eldonata en Brazilio (ĉefredaktoro William AULD). En la tria (n° 11, aŭgusto), tri poemoj de Jaufre RUDEL, trobadoro el la XII jarcento, el la Okcitana esperantigitaj de Timothy B.CARR. Ŝajnas, ke la demando fariĝas aktuala.

V A L O

- (1)- PIEDNOTO : Krome, en Rusiljono la Kataluna lingvo dialektiĝis pro alprenado de francaj esprimoj. Ambaŭflanke de Pireneoj ja nun estas, laŭ la lingvo, tre malproksimaj parencoj. Plie, nia Rusiljona dialekto pli kaj pli rapide perdiĝas.



Vojaĝo al Brazilio kaj Rio

Okaze de iu kunveno, mi troviĝas apud gesinjoroj GUILLAUME. Subite, iu viro alparolas S-inon Guillaume, ĉar li konis ŝin (kaj cetere ankaŭ ŝian familion), kiam ŝi estis dekokjara. Interesa afero por mi estas (tion oni klarigis al mi poste), ke temas pri la pra- pra- pra-nepo de N. Waleska.

Dum la tuttaga ekskurso, mi elektis vojaĝon al Cristalina, urbo situanta 130 km sude de Brazilio. En la aŭtobuso, mi sidas apud Vasja, babilema kaj moviĝema bulgarino. Ŝi sciigas al mi, ke ŝi estis la kasistino de la Varna-Kongreso kaj ke ŝia brazila vojaĝo kostas al ŝi la ekvivalenton de 10 monataj salajroj. Ĉe la alia flanko de la aŭtobuso sidas E. SYMOENS; mi konas lin laŭnome ĝis nun pro la interesaj artikoloj, kiujn li verkis por la revuo MONATO, en 1980, pri la sendependiĝo de belgaj afrikaj kolonilandoj. Dum la tuta vojaĝo ni trapasas nur savanon kaj E. Symoens asertas, ke ĝi samaspektas en Afriko. En tiu regiono troviĝas ĉiuspecaj minejoj kaj svarmas en Cristalina vendejoj de belaj gemoj. Sed ankaŭ surstrataj junaj vendistoj abundas kaj oni avertis nin nenion aĉeti al ili. Tamen tion kelkaj el ni faros. En la "churrascaria" (tipa tiea restoracio) ni tre bone kaj abunde manĝas. La plej notinda tipaĵo konsistas el vianĉaĵoj trapikitaj sur spado enpuŝita kun 3 aliaj en sufiĉe granda lignero metita sur la tablo. La ekskurso iom fuŝiĝas, ĉar estas truo en la trasaŭvana vojaĉo kaj la busoj ne povas plue antaŭeniri. Estis antaŭvidite viziti minejon kaj etan akvofalon. Finfine ni revenas al Brazilio kaj laŭlonge de la vojo ni vidas centojn da termitejoj.

Iun tagon mi parolas kun S-ro MESPLEDE el Arcachon kaj dum la konversacio li sciigas al mi, ke la fama vagonareto de Palavas nun funkcias en Marquèze (Landes). Tio estas historieto komprenebla nur de Montpellier-anoj. Temas pri malnova kaj malrapida sed ege populara vagonaro, kiu veturis de Montpellier ĝis Palavas-les-Flots ĉe la Mediteranea marbordo (ĉ. 10 km), kaj kiu ne plu funkcias de almenaŭ 15 jaroj pro ekonomia kialoj.

Vendredon posttagmeze, la franca ambasadoro en Brazilio invitas ĉiujn francajn gekongresanojn. Nu, je la 14a horo, ni foriras aŭtobuse el la kongresejo kaj post sufiĉe longa serĉado ni haltas antaŭ la trikolora flago, kie priklereca delegito atendas nin. La ambasadoro kaj lia edzino akceptas proksimume kvindek da francoj; dum unu horo ni interbabilas, manĝetas biskvitojn, trinkas kafon aŭ francan ĉampanon. Poste ni revenas al la kongresejo, ege kontentaj.

Pro miskompreno inter ni kaj la vojaĝagentejo ni ne povas ĉeesti la solenan fermon de la 66a U.K. kaj devas iri je la 10a al la flughaveno por flugi ĉu al RIO, ĉu al la grandega akvofalo "IGUACU". Tiamaniere ni adiaŭas la grandegan brazilan ĉefurbon kaj ĝian kongreson.

Louis ENSUQUE



Jam antaŭ unu jaro D-ro SALAN estas mortinta, fakte la pasintan 5-an de februaro 1981, D-ro Georgo SALAN forpasis sendolore post kelkaj minutoj. Kun profunda emocio la direkcio de S.F.S. rememoras lian personeco per minuto da silento en tiu malgaja datreveno.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal: 1^{er} Trimestre 1982

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes

SOMERO 1982

Restado de dimanĉo la 12a de septembro (posttagmeze)
ĝis dimanĉo la 19a de -
Aliĝilo kaj kursoj: 55 FF.

Loĝado kaj la tri manĝoj: (por 7-taga restado)
- en 1 persona ĉambro: 896 FF.
- en 2 persona ĉambro: 700 FF.

Datlimo por antaŭmendo de dormoĉambro: la 1a de julio.

Limigita nombro de **partoprenantoj**: 35.

Pro tiu limigo farita de la gastiganta organizaĵo, la antaŭmendo valoros post pago de 100 FF por ĉiu perso-
no kaj ricevo de nia konfirmilo.

Programo. Matene: -diversgradaj kursoj.

Posttagmeze: -libervolaj ekskursoj.

-kursoj aŭ libera tempo.

Vespere: ludoj, kantoj, prelegoj, diapozitiv-
voj.

000000000000000000

FTE 1982

Séjour du dimanche 12 septembre après-midi
au dimanche 19 septembre après-midi.

Adhésion et cours: 55 Francs.

Pension complète pour 7 jours:

-dans une chambre pour 1 personne: 896 F

-dans une chambre à 2 lits: 700 F.

Date limite d'inscription pour l'hébergement:

1er juillet 1982.

Nombre de lits limité à : 35.

Le nombre de places étant strictement limité par l'organisme d'accueil, la réservation ne sera effective qu'après versement de 100 Francs d'avance par personne et confirmation de notre part.

Programme. Matin: - cours de différents niveaux.

Après-midi: -possibilités d'excursions.

-cours ou temps libre au choix.

Soirées: jeux, chants, causeries, projections.

Venus, Viduo,



Kaj Feliĉo...

SEJOUR LINGUISTIQUE DE SÈTE .

Le Centre Culturel Espéranto de Montpellier est heureux de vous proposer de passer une semaine de vacances, de détente, au soleil de la Méditerranée, dans une ville immortalisée par le poète et le chansonnier; en même temps, initiez-vous à l'ESPERANTO, ainsi qu'à de nombreuses autres activités.

La Méditerranée vous offre ses plaisirs; offrez-vous le plaisir de les agrémenter de relations culturelles, humaines, d'excursions dans le Languedoc...


Faites avec nous, que vos vacances ne soient pas que des "simples vacances"...
...Mais des vacances enrichissantes.

000000000000

Feriu tutan semajnon en agrabila urbeto ĉe l'mediteranea marbordo; samtempe, perfektigu vian scipovon de Esperanto, kaj partoprenu ĉiujn ajn kulturajn aferojn, ekskursojn tra nia regiono...

En la Familia Centro de Lazaret (Sète), kie la Kultura Esperanto-Centro organizas la aferon, la internacia kaj amikeca etoso donos al vi okazon konatiĝi kun alilandaj samideanoj...

Ĝis la plezuro konatiĝi kun vi !!!



Por ĉiuj informoj: (pour tous renseignements)

ESPERANTO

5, rue du Docteur ROUX, 5 (FRANCIO)
F-34000 MONTPELLIER

C.C.P. Montpellier 1487 48 D